



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

PER UNA TASCA EFECTIVA

Una crida a tots els esperantistes

Decididament, cal que tots els esperantistes catalans es convinguin a fer una tasca col·lectivament efectiva per tal de donar al nostre moviment un ritme de progrés constant i una força convenientment organitzada que pugui emprendre tasques d'interès positiu, encarrilades a donar a l'esperantisme català una posició ferma i potent davant de les institucions oficials i particulars de la nostra terra.

Mentre els esforços es descabdellin isoladament com fins ara, no és possible que fem res gaire ferm: cal anar de dret a la unió definitiva de les forces existents a Catalunya. Si no ens decidim a prescindir de les actuacions de capelleta i de personalismes, l'esperantisme català romandrà llastimosament en aquest marasme, que a la fi acabarà amb l'entusiasme d'uns quants lluitadors de bona voluntat que encara es troben en els nostres rengles.

Es davant d'aquesta situació deplorable que el nou Comitè de la Federació Esperantista Catalana adreça aquesta crida als esperantistes catalans i els demana que per un moment meditin sobre les paraules que diem, i que mesurin llur responsabilitat davant l'esperantisme mundial, si per inèrcia o per una incom-

premsió que no pot tenir justificació, s'estronca per sempre més — i aquest és el camí que portem si no hi posem esmena — el tradicional bell fer dels propulsors catalans de la gran idea del Dr. Zamenhof.

Sota la bandera de K. E. F.

En primer lloc és inajornable la incorporació de totes les organitzacions sota la bandera de la Federació Esperantista Catalana. Han de formalitzar la seva adhesió aquells grups que tenen feta la promesa d'ingressar-hi i que ens són necessaris. Aquells que no han pres encara el determini, faran una gran tasca de profit efectuant-ho immediatament. Així serà possible que dintre d'aquest any s'acompleixi la unió total. Consti que no volem desviar els grups de classe: aquests tenen el seu camí marcat. La K. E. F. no té cap caire polític ni social. La nostra tasca no és altra que la defensa dels interessos esperantistes sota una norma democràtica i amb ple coneixement dels drets de l'home.

Delegacions de K. E. F.

A les localitats on no hi ha esperantistes organitzats o bé, si n'hi ha, aquestes organitzacions no són adherides encara a la K. E. F., ens cal trobar un company al qual confiar la delegació i que tingui cura de fer federats i de trobar subscriptors de *Kataluna Esperantisto*. Dintre dels grups federats necessitem també un representant nostre, nomenat pel mateix grup, al qual encarregar la tasca de propaganda del nostre òrgan i afers afins.

Sense un contacte constant amb tots els nuclis esperantistes, no podem pretendre una tasca positiva, i aquestes delegacions escampades arreu de la nostra terra, han d'ésser els puntals sobre els quals bastirem una organització sòlida i fructífera.

Les delegacions que ja tenim establertes continuaran com fins ara.

K. E. F. adherida a U. E. A.

Per acord de l'Assemblea general del 1^r de juliol, la Federació Esperantista Catalana s'ha adherit a U. E. A., reformada pel Conveni de Colònia.

Conseqüentment els membres de K. E. F. ho són automàticament de l'organització universal.

Per aquest sol fet, per la tradició internacional que frueixen

els esperantistes catalans, cal que multipliquem els nostres esforços, amb el fi de representar dignament davant el món esperantista el paper que ens pertoca.

Oportunament seran presentats als federats de Barcelona els rebuts corresponents a U. E. A., pts. 1,25 anuals. No cal dir que els qui ja eren socis d'U. E. A., no hauran de pagar aquest rebut.

Preguem a tots els federats d'altres localitats, en les quals no hi hagi representant, que ens trametin l'esmentada quantitat amb segells de correus.

Mots finals

Confiem que tots els esperantistes es capacitaran de la importància de la nostra crida i que tots respondran com pertoca a tot bon lluitador de l'ideal que defensem. No siguin aquestes, paraules en va. Si responeu a la nostra crida amb entusiasme, nosaltres sabrem respondre també com cal.

Sebastià Alberich Jofrè, Joan Gili Norta, Rafael Gisbert Garcia, Samuel Roca Rodó, Jaume Herp Sanmartí, Emili Carbonell Esplugas, Josep Alberich Jofrè, Josep Banet Tort i Eusebi Pons Martorell.

XVI.^{aj} INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

EKSTERORDINARAJ TEMOJ (vidu K. E. Nrojn. 204-205)

VII Premio de «HEROLDO DE ESPERANTO» (ankoraŭ difinota) de valoro de proksimume 50 pesetoj, Temo laŭvola.

VIII Premio de «LITERATURA MONDO», ekzemplero de Enciklopedio de Esperanto, ilustrita eldono, bindita en du volumoj. Temo: originala novelo.

IX Premio de «LITERATURA MONDO», jarkolekto de 1932. Tema: Originala poemo.

X Premio de «LITERATURA MONDO», jarkolekto 1934. Temo: Originala poemo.

Verkoj ricevitaj (Dua listo ĝis 15a. de julio 1934a.)

15. La perfidanta koro. — 16. Triope. — 17. Kvin rimaĵoj de Becquer. — 18. Vetero ŝanĝas. — 19. Elvokoj antaŭ trovaĵo. — 20. Mia «unua» kiel elektristo. — 21. Siringoj...! Siringoj...! — 22. Konflikto sub sunlumo. — 23. Vesperaj Sonoj. — 24. Malespero. — 25. La filo perdita. — 26. La eksplodo.

Novajn premiojn kaj temojn ni anoncos en venontaj numeroj de Kataluna Esperantisto. La Sekretario, Joan Gili Norta.

EN MAJA TAGO

Mi en la stepoj de Aksaj'¹
 Aglidon kaptis je hazardo, —
 En blua tago de la maj'
 Forgesis ĝi pri la singardo.

Sub miaj fingroj pulsas kor',
 Kaptita koro de l'aglido.
 Kaj sendetene ŝprucis for
 El mia gorg' triumfa rido.

Ja aglo min rigardas nun,
 Pri mi ĝi pensas en ĉi horo,
 Kaj mian bildon al la sun'
 Kun si ĝi levos en memoro.

En sindefend' sovaĝa min
 Aglid' per ungoj siaj gratis,
 Sin elturnante en obstin',
 Min per flugiloj plumbaj batis.

Mi kisis ĝin per frata kis',
 Per ĉasta kis' de simpatio,
 Kaj en l'abismon de turkis'
 Forlasis ĝin en emocio.

En stepoj silkaj de Aksaj'
 Mi kaptis filon de aero,
 En blua tago de la maj'
 Forgesis ĝi pri la danĝero.

IVAN LUBJANOVSKIJ

LA ŜNURTIRO

de M. E. Francis

(fino)

Dum la ekscita kaj ĝojplena elverŝo de Suzano, Kando mal-laĉadis la botojn en konscienca kaj pena maniero. Je la pli elstaraj punktoj de ŝia parolado, oni povus vidi lian fingron halti en la ago sin meti ĉirkaŭ la grasa leda laĉo, sed

(1) Branĉo de rivero Don (suda Ruslando).

li ne levis la kapon ĝis la fino de la rakonto, kiam li supren rigardis kun tre ruĝa vizaĝo.

—Ĉu vi okaze kunportis kun vi tiun valentinon?—li demandis.

—Mi ja faris tion — gaje respondis Suzano; kaj ŝi eligis ŝin el sia grandampleksa poŝo—. Jen, ĝi estas la plej bela objekto kiun mi iam vidis. Mi ne scias, kiel vi sukcesis trovi ĝin. Ĝi povus esti farita speciale por ni. Kaj pensu, ke mi neniam antaŭe divenis tion, kio estis en viaj pensoj—sed tuj kiam mi tiris la ŝnuron, — la benataj etaj ŝnuroj!

Ŝi haltis balbute, kaj Kando, prenante de ŝia mano la koverton, silente procedis esplori la enhavaĵon. Jen estis la rozoj, jen la ĉirkaŭantaj rubandoj kaj la pendantaj finaĵoj. Prenante unu kaj poste alian el tiuj ĉi inter siaj grandaj fingro kaj dikfingro, li zorge tiris ilin. Jen surprize, la floraro glitis malsupren, malkaŝante en la centro de la valentino grandan karmezinan koron, ambaŭflanke de kiu aperis versaĵo en inko samkolora.

Meĥanike forskuante la botojn kaj ŝovante la piedojn en la pantoflojn, li iris pli proksimen al la lumo, kaj legis jene:

La roza bukedo
Malkaŝas sekreton,
La koron fidclan de mi.
Jen mia sugesto!
Klopodoj pri l' resto.
Ja estas farotaj de vi.

Feliĉe, kompatinda Suzano modeste deturnis la vizaĝon, kaj ne vidis la konsternegon esprimatan sur tiu de Kando.

Do la valentino, kiun li tiel zorge elektis, ne nur pro ĝia bela ŝajno sed pro ĝia manko de ĉia «malsaĝeco», portis al ŝi deklaron, kiun la kompatinda senkulpulino akceptis serioze! Kion ajn li devas fari?

Suzano ripetis la lastan verson kun nervema tremo, tamen fariĝante fervora kiam ŝi aldonis: «Ne estus tiel facile, fari klopodojn pri l' resto, ĉe iu alia; sed ĉe vi, S-ro. Kando, vera amiko kiel vi mem diris hodiaŭ matene, nu, mi supozas, ke ni komprenas unu la alian!»

Kando faris sensilaban murmuron, gratante la kapon.

—Mia sola amiko, kiel mi povus diri — daŭrigis Suzano emocie.

La poŝtisto tuis kaj ĉirkaŭrigardis, samtempe konscia pri la komforta varmeco de siaj pantofloj—sento kiun li ŝuldis al la antaŭzorgo de Suzano. Vidante ke ŝi etendis la manon, li

rapide faris same, firme, premante la ŝian kaj vigle skuante ĝin, sed ne parolante. Varma, graseta mano, sed maldelikata pro senĉesa laborado; ĝuste kiam li premis ĝin, la penso enkuris en lian menson ke neniam, dum ĉiuj jaroj kiam li konis ŝin, li trovis Suzanon neokupata.

Liaj okuloj ĉirkaŭrigardis la ĉambron, rimarkante ke la planko estas balaita, la antaŭkameno purigita, kaj — nu, efektive ŝi trovis tempon por poluri la potojn kaj kaserolojn kiuj longe pendadis rustkovritaj sur la muro; eĉ la malnova litvarmigilo lumis per noveprenita heleco!

—Jes, mi sukcesis plenumi multe da laboro dum mi atenda-dis — diris Suzano, observante lin—. Mi volus labori por vi ĝis la fingroostoj elstariĝu! — ŝi aldonis fervore.

Kando rigardis ŝian vizaĝon kun esprimo kiu fariĝis pli kaj pli mola, kaj notis ian sopiron inter ĝia feliĉo.

—Mi scias ke mi ne egalas vin je la lerteco — humile diris Suzano—; mi neniam estis lerta, kaj mi supozas ke estis pro tio, ke mia patro lasis min kvazaŭ ŝarĝon sur mia fratino.

—Tute ne ŝarĝo, mi pensas — diris Kando, indigne—. Nu, estas vi kiu irigas bone la tutan domon!

Li kuraĝige frapetis la labormakulitan manon, kaj poste ĝin tiris firme tra sia brako.

—Ili devos seniĝi je vi nun — li diris; tiam subite ekridis. —Kion ajn diros tiuj du knabinoj kiam vi sciigos ilin? — li kriis triumfe—. Nepre insistu, ke ili tiru la ŝnurojn!

—Nu, kompreneble, tio estas la unua ago, kiun ĉiu farus —respondis Suzano.

—Kompreneble — li konsentis, tamen dube—, nepre la unua ago!

Li metis la brakon ĉirkaŭ ŝian dikan talion kaj premis kison sur ŝia ronda vango.

—Neniam diru al mi ke vi ne estas lerta, mia kara — li kriis, pro kio Suzano sentis sin pli fiera ol ŝi iam sentis sin en la tuta vivo.

Kaj tiel Suzano, kiu antaŭe neniam havis ion sian propran, subite trovis sin posedantino de du bagateloj feliĉigaj al virino — edzo kaj hejmo. Estante malnovmodulino, ŝi kontentiĝis per tiuj — fakte, la sola bedaŭrinda makulo en ŝia feliĉeco estis tio, ke pro iu ne komprenebla kialo la familio Inkpen neniam pardonis ŝin.

Trad. LOUISE BRIGGS

(Premiita de la «Internaciaj Floraj Ludoj.»)

MONUMENTO AL LA NEKONATA ESPERANTISTO

Vin, kiun mi ne konas kaj tamen amas, amas pro kunaperteneco, vin mi celas per miaj modestaj vortoj. Ĉu vi vivas? Ĉu vi jam mortis? Mi ne scias. Kie staris via lulilo? Per kiu lingvo via patrino kante endormigis vin? Ĉu vian junaĝon vi pasigis en lando krudklimata, aŭ ĉu karesa suno suda ridetis pro viaj naivaj ludoj en sablo kaj akvo?

Kaj kiam aperis en via vivo, en via eble tre peza, dornoplena ekzistado unuafoje la brilo de la verda stelo? Mi kapablas senti vian korbataĉon, ekzaltitan pro entuziasmo, pro surprizo pri la nova aspekto de l' mondo en la lumo de nia sankta afero. Ho, kun kiom da sindonemo vi aŭskultis, elparolis la nomon «Zamenhof»! La Majstro per sorĉa vorto «Esperanto» forŝiris, almenaŭ spirite, de antaŭ viaj okuloj barantan vualon, kaj jen: Vi vidis, vi vere nun vidas. Homfratojn vi vidas, transe kaj maltranse de la limoj, kontinentoj, oceanoj.

Via lango jam ne estas katenita. Libere flugas paroloj, esprimiĝas intimaj pensoj. «Fremda» estas vorto jam ne plu terura, kvankam vi eble iam staris sur nekonata tero, inter nekonataj al vi homoj. Sed

Ho, dolĉa voko, agrablega sono
de l'hejma lingvo en la fremda lando

vi povis eldiri kun Ifigenio, kiam vi meze el la granda amaso poste aŭdis soni vortojn Esperantajn, vortojn hejmajn. Ĉu ne estis tiel, amiko nekonata el la verda popolo? Ĉie estas nia lingvo hejma. Kaj tial: kiu povus veneni vian animon per la instrumento de la lingvo, ĉar vi, ni ĉiuj ja komprenas, amas kaj respektas unu la alian.

Sed, ho nekonato, tre bone mi ankaŭ scias, ke malgraŭ la brilo de l' verda stelo en via vivo ne mankas maldolĉaĵoj. Eble perlaboro de l' ĉiutaga pano estas por vi malfacila tasko, verŝajne vin jam trafis la kruela skurĝo de senlaboreco. Sed tamen vi neniam avaris sed laŭpove oferis kaj oferas per abono al gazetoj, subteno al societoj, aliĝo al asocioj, partopreno al kongresoj. Kaj — nenia egoista penso vin pelis. Vivu Esperanto, progresu nia ideo ĝis finvenko, jen kio estis via ĉiama deziro. Kaj se vi ankoraŭ vivas, la sama ardo, mi estas certa pri tio, ankoraŭ brulas en via koro.

Modesta, tro modesta vi estas, amiko. Vi kaŝas vin, ne emas eminenti. Kaŝe vi laboras, kaŝe vi gajnas adeptojn kaj adeptojn. En kongresoj vi rigardas de malproksime al niaj famuloj. Sed

ankaŭ vi estas famulo, ho nekonato. Mi kiu ne konas vin, tamen admiri devas vian nedeklineblan fidelecon. Kaj ĝuste tial mi amas vin. Permesu, karulo ke mi starigu al vi monumenton en mia koro, monumenton kun eterne brulanta flamo honore al vi, ho nekonata homfrato-esperantisto!

JOSEPH F. BERGER

LA POPOLA KANTO EN JAPANUJO

Enprofundiĝante en la esplorojn de la popolaj kutimoj, mo-roj, legendoj, arto kaj kanto, oni konstatas kun surprizo, ke eĉ la plej malproksimaj popoloj havas kelkajn komunajn ecojn. Studante ekz. la japanan kanton, vi certe retrovos ofte simi-lajn temojn en iliaj kantoj, kiujn vi renkontas en la kantoj de via popolo. Ofte eĉ la okazoj dum kiuj la japana popolo kantas estas la samaj.

Laŭ la enhavo la japana popolkanto dividiĝas en kvar gru-pojn:

- 1) monozukuŝi
- 2) muĉi-juki
- 3) renka
- 4) home-uta kaj akutai

La monozukuŝi'oj estas kantoj, kiuj laŭvice elnomas di-versajn objektojn, ofte sen iu ajn senco. Ilia origino kuŝas en la kantoj, kiuj nomiĝis niimuro-no-utage kaj kiujn oni kantis dum la finkonstruado de domoj. Tiu spec-maniero retro-viĝas en la kantoj de l'infanoj kaj en la kantoj waza-uta.

La muĉi-juki'oj estas kantoj, kiuj elnomas la lokno-mojn; ili originas certe el la diecaj recitaĵoj, en kiuj oni kuti-mis citi la diversajn lokojn, tra kiuj la diaĵo pasis.

La renka'oj estas am-kantoj; komence ili estis speco de dialogoj, poste la enhavo ŝangiĝas, sed ĝia esenco restis la sa-ma: dediĉita al la korpa kaj volupta amo.

La home-uta'oj laŭdas eminentulojn kaj diversajn per-sonojn, dume la akutai'oj estas la kantoj de l'kritiko. Tiuj kantaj formoj ekzistas en la kagura'oj, en la klasikaj teatraĵoj kabuki kaj ofte en la lulkantoj.

Ekzistas ankaŭ kantoj, kiujn laboristoj kantas dum ilia la-boro, aliaj, kiujn oni kantas dum religiaj festoj aŭ ceremonioj; kaj fine ankaŭ diversaj porplezuraj kantoj.

La malnovaj laborkantoj estas malaperantaj, ĉar la labor-kondiĉoj de l' japana popolo senĉese ŝanĝiĝas; tiuj kantoj ne plu respondas al la moderna labormetodo, al la nuna ritmo de l' maŝinoj. Ankaŭ la kantaj melodioj ŝanĝiĝas; la nova generacio preferas bedaŭrinde la okcidentajn melodiojn kaj kutimiĝas al ili, forgesante la ĉarmon de l' malnova kanto.

Tamen en la vilaĝoj la malnova kanto ne forgesiĝas. La vilaĝano kantas por helpi al si ĉe la laboro. Ankaŭ religiaj kantoj estas multe disvastigitaj. Ekzistas kantoj de l' semado, kantoj de l' gren-rikolto, kantoj de l' morus-rikolto, kantoj de l' tearba rikolto ktp. Preskaŭ por ĉiuspecaj kultur-laboroj ekzistas specialaj kantoj. La moĉi'a kanto estas kantata ĉe l'jarfino, kiam oni pistas la rizon por fari specialajn kukojn.

Inter la laborkantoj meritas specialan atenton la kanto de virinoj, kiuj laboras por solidigi la terenon, kiun oni preparas por surkonstruado. Tiuj kantoj havas specifan karakteron kaj nomiĝas *jitsuki-uta*. Ekzistas ankaŭ multaj aliaj kantoj, kiujn oni kantas dum la diversaj fazoj de l' konstruado, ĉu dum la transportado de pezaj ŝtonoj kaj aliaj ŝarĝoj.

La japana popolo havas ankaŭ kantojn de l' fiŝkaptistoj, de remistoj kaj de l' silk-ŝpinistinoj.

La ceremoniaj kantoj estas ligitaj al certaj kampaj ritoj. La japana popolo havas kantojn de l' printempo, kantojn de l' aŭtuna komenco kaj de l' vintromezo kiel ekz. *inoko-uta'o*j, *jakuhara'o*j ktp.

Krom la ceremoniaj gravan rolon ludas la kantoj de l' religiaj festoj kaj de l' edziĝofesto; krome kantoj de l'amuzo kiel la *hanetsuki-uta'o*j, kiujn oni kantas dum kur-ludo.

Granda parto de l' popolaj kantoj estas akompanata de dancoj; oni kantas kaj dancas al dioj por havi bonan rikolton; oni dancas kaj kantas, kiam la rikolto estas bona, oni dancas kaj kantas por elpeti pluvon ks.

Lastatempe la japana intelektularo multe interesiĝas pri la popola kanto, same kiel tio okazas en la eŭropaj landoj. Kreiĝis eĉ Societo *Nihon Min-jo Kjukwai*, kies celo estas favori la japanan popolkanton kaj subteni ĝian disvolvon.

S. T. GRENKAMP-KORNFELD

EDZIĜO JUNAĜA — NENIAM DOMAĜA

GROTESKAĴO

Enjo havis koleregon kontraŭ la edzeco. Kvankam ŝi ja estis ankoraŭ tre juna. Nur 17 jarojn ŝi havis kaj 8 monatojn. Tamen ŝia kolerego rezultis el propaj spertoj. Ŝi estis edzino jam de kelkaj tagoj. Oni ja diras: «Edziĝo junaĝa — neniam domaĝa», sed al Enjo ŝia junaĝa edziniĝo alportis jam multe da trompiĝoj.

Esence ne estis la edzeco mem, kiun celis ŝia kolerego, sed ties «kunaĵoj», la leĝaj postuloj, kiuj rilatas al geedziĝo, la obstino, per kiu la registaro alkroĉiĝas al tiuj postuloj, ktp.

La edzeco mem aŭ — pli trafe — diversaj agrablaĵoj, kiujn ĝi prezentas, eĉ forte plaĉis al ŝi; antaŭ ĉio la liberigo el la kontrolo de la gepatroj. Sed, kiel jam dirite, la «kunaĵoj» kaj la nepra superflueco de la formalajoj!

La ĉefa kaŭzo de ŝia edziniĝo ja estis «Veroniko», kaj ĉirilate ŝiaj espero estis tute detruitaj.

En «Palaca Kino» oni prezentis filmon kun la titolo «Veroniko apud la abismo». La plej bona amikino de Enjo, la 19-jara Johanino, estis ĝin vidinta. «Ho, Enjo», ŝi diris, «tion vi nepre devas rigardi. Kiam Veroniko kun la grafo iras en Trokadero kaj poste en la hotelon «Leda Cigno»... Kaj kiam poste, sur la strato, ŝi interkonatiĝas kun la brokantisto... Tio estas troo ekscita!».

Kaj tiam Enjo, kompreneble, ankaŭ volis vidi la filmon. Sed kiam, iun vesperon, ŝi staris antaŭ la kaso de la «Palaca Kino» kaj postulis bileton, la kasistino direktis la brile poluritan ungon de sia dekstra montra fingro al tabulo kaj ne donis al ŝi bileton. Ĉar sur tiu tabulo estis pentrite:

Al gejunuloj malpli ol 18-jaraj
la eniro estas malpermesita.

Kaj Enjo havis la malbonŝancon, ke, malgraŭ siaj 17 jaroj, ŝi aspektis kiel 16-jara.

En tiu vespero la filmo pri Veroniko estis lastfoje prezentata en «Palaca Kino», kaj de post morgaŭ ĝi estos montrata en «Thalia Kino»,

Du tagojn poste Enjo faris novan klopodon ĉe la kaso de «Thalia Kino», kaj tie ŝi havis la saman — negativan — sukceson rilate la enirpermeson. Sed anstataŭe la sorto, du minutojn

poste, prezentis al ŝi alian — pozitivan! — sukceson: ŝi interkonatiĝis kun Paŭlo.

Paŭlo estis observinta ŝian malsukceson kaj volis ŝin konsoli, invitante ŝin al Opereta Teatro.

Paŭlo estis 20-jara kaj pakajisto ĉe la firmo Nenifar & K-o, kaj Enjo tuj plaĉis al li. Kaj ju pli longe li babilis kun ŝi, des pli bone ŝi plaĉis al li. Krome, li estis tre ambicia junulo kaj vengema. Li ja havis ankaŭ aliajn karakterajn ecojn, sed liaj ambicio kaj vengemo estis decidaj pri lia estonteco kaj la estonteco de Enjo.

Lia kolego ĉe Nenifar & K-o, Ernesto, estis nur kvar semajnojn pli aĝa ol li kaj edziĝis antaŭ du semajnoj. Ĉu tia pluso estas senfare akceptebla? Ne! Kaj tial lia ambicio ne lasis al li pacon: ankaŭ li devas nepre edziĝi kiom eble plej rapidege.

Li kaj lia lasta «fianĉino» dismalpacigiĝis antaŭ kelkaj tagoj, kaj tial Enjo estis al li eksterordinare bonvena. Se li geedziĝos kun ŝi plej repidege, Ernesto ne tro multe superis lin, kaj samtempe li povus per tio fari vengon al sia lasta «fianĉino».

Ankaŭ koncerne «Veroniko»-n kun ŝia abismo li povos, per geedziĝo kun Enjo, kontentigi sian ambicion kaj satigi sian vengemon: kiam Enjo estos lia edzino, neniu povos plu malpermesi al ŝi la eniron en kinon. Kaj kiam, iun vesperon, li do sidos kun Enjo antaŭ la ekrano, sur kiu la abismo de Veroniko forruliĝos metron post metro, tiam li atingis la gravan celon, kiun metis antaŭ li Enjo, kaj samtempe li venkis super «Palaca Kino», «Thalia Kino», «Centra Kino» kaj ĉiuj aliaj kinoj en la mondo. En ĉiuj nomitaj kinoj, unu post alia, oni intertempe montris Veronikon, kaj ĉie oni ne enlasis Enjon, ĉar «al gejunuloj malpli ol 18-jaraj la eniro estas malpermesita».

Ili do decidis interedziĝi, kaj nun en Enjo naskiĝis la malmalego kontraŭ la «kunaĵoj». Unue ŝia patro devis doni sian permeson. Tion li komence ne volis, ĉar Paŭlo estis nur pakajisto. Ĉu purigisto de stratlanternoj — tio estis la patro de Enjo — estis io pli alta? Kaj, cetere: kial oni postulis de Enjo la permeson de ŝia patro, se ŝi intencas edziniĝi? Ĉu 17-jarulino ne estas jam eksega lernejanino? — Poste oni devis prizorgi dokumentojn. Kaj kiam ili ĉiuj amasiĝis, la edzigisto faris ekstran malfacilaĵon pro ridinda C aŭ K: la patro de Enjo havis la antaŭnomojn Carlo Aŭgusto Johano — Carlo kun C, kiel Carlo Bourlet, la iama redaktoro de La Revuo —, kaj sur la atesto pri naskiĝo de Enjo pro iu ajn kialo estis skribite: «... filino de Karlo Aŭgusto Johano Neniul» — Karlo kun K.

Kaj ĝis kiam ĉiuj tiuj malfacilaĵoj estis venkitaj, la filmo

«Veroniko apud la abismo» estis montrata ankoraŭ nur tute ekstere en la antaŭrba «Lum-Palaco».

Sed ĉiuj malfacilaĵoj estis fine forigitaj, kaj Paŭlo kaj Enjo geedzigitaj. Ili ricevis ateston pri ĉi tiu okazaĵo, iris hejmen kaj festis la tagon per kolbasoj kaj rostitaj terpomoj.

Kaj kiam la postan tagon ili vekigis, ŝia unua frazo tekstis: «Hodiaŭ vespere ni vizitu la Lum-Palaceton».

Vespere ili tien veturis. Paŭlo iris al la kaso, super kiu pendis kartonplato kun diklitera surpriso:

Hodiaŭ lastfoje «Veroniko apud la abismo»!

Fiere li postulis du loĝiajn biletojn, kaj la fraŭlino donis ilin al li. Sed kiam li estis transdoninta la biletojn al sinjoro la pordisto, por ke li deŝiru de ili anguleton, la pordisto akre esplorante rigardis Enjon, sendifekte redonis al Paŭlo la biletojn kaj diris:

«Ne, fraŭlino, al vi mi ne rajtas permesi eniron!».

Kaj tion dirante, li montris al tabulo super la enirejo, kiu havis la gravegan surskribon: «El gejunuloj malpli ol 18-jaraj la eniro estas malpermesita!»

«Sed ni ja estas geedzoj», fiere ekkriis Enjo.

«Nu, fraŭlino, tio ja ne estas tre kredebla», respondis la potenculo kaj ridetis malice. «Ĉu vi ne bonvolas montri al mi vian ateston pri geedziĝo?».

«Ĝin ni ja ne portas en nia poŝo», respondis Enjo, kaj ŝi sentis, ka ŝiaj okuloj malsekiĝas.

«Do tiam mi forte bedaŭras», ridetis la pordisto.

Sed Enjo jam retrovis sian ekvilibron.

«Paŭlo», ŝi komandis, «rapide veturu hejmen kaj alportu la ateston. Mi atendos ĉi tie».

«Jes ja», obee respondis Paŭlo, kaj jam pafis sin for.

Post duonhoru li revenis kaj montris al la pordisto la gravan dokumenton.

«Do pardonu», ĝentile diris la cerbero nun konvinkita, senanguligante la biletojn. «Mi devas esti singarda pro la polico».

Poste li disŝovis la iom mizeran kurtenon antaŭ la enira pordo kaj lasis trapaŝi la paron.

La salonego ĝuste remalheligis, kiam ili envenis. Sur la ekrano ekvidiĝis eglitere la titolo de la komenciĝonta filmo: «Ĉaplin serĉas ĉambron».

«Ĉu al ĉi tiu filmo sekvos «Veroniko apud la abismo»?», Enjo demandis la lokantinon.

«Ne», respondis ŝi. «Veroniko estas ĵus finita... Post Ĉaplin estos fino por hodiaŭ».

«Kaj morgaŭ?», tremvoĉe demandis Enjo.

«Morgaŭ ni havos tute novan programon, fraŭlino».

Nun Enjo vere ekploris, dum ke ĉirkaŭ ŝi ĉiuj ridegis plengorge pro ĉaplin la komikega.

Kaj la «Lum-Palaco», estis la lasta kino de la urbo, en kiu oni prezentis Veronikon.

KARL MINOR

KIEL ONI FARAS BONSTILAN TRADUKON

Profesoro Meillet en «Les langues dans l'Europe nouvelle» diras, «Pour apprendre a bien connaître les ressources de sa propre langue et pour en pénétrer l'esprit, il n'y a pas d'exercice meilleur que la traduction». (Por bone koni la enhavon de sia propra lingvo, kaj por ensorbi ĝian spiriton ne estas pli bona rimedo ol traduko.)

Por fari bonstilan tradukon, oni devas observi kelkajn ĝeneralajn principojn: unue, la tradukaĵo devas enhavi ĉion, kio estas en la verko tradukota; nenio devas esti forigata aŭ aldonata. Due, la traduko devas esti ne nur laŭvorta sed laŭsenca; fantaziaj esprimoj, bildaj vortoj kaj metaforaj provas esti tradukataj se ili estas komprenataj de aliaj nacioj, alie oni devas traduki la ideon aŭ anstataŭi per similaĵo. Trie, la traduko devas speguligi la stilon de la originalo, ĉu hejmecan, kleran, babileman, imponan aŭ priskriban, kaj la lingvaĵo devas esti taŭga kaj konvena al la stilo. Estas bone ke la tradukanto sciu iom pri la aŭtoro, lia vivo kaj vidpunkto por pli bone kompreni liajn pensojn. Kvare, la traduko devas ne nur fidele doni la ideojn kaj imiti la stilon de la originalo, sed ĝi devas havi belsonon kiam legata aŭ deklamata. Kvine, ĉar ĉiuj lingvoj senĉese evoluas kaj ŝanĝiĝas, estas necese, ke la tradukanto legu multajn verkojn de siaj plej famaj verkistoj kaj lernu parkere, se eble, poemojn en sia propra lingvo, ĉar tiamaniere oni konstatas kiel brilaj, geniaj verkistoj esprimas la pensojn, kaj oni havos je dispono, vortojn kaj frazojn altgradajn kaj belsonajn, ne alie haveblajn.

Nu kiam la dua traduka lingvo estas Esperanto, la samaj principoj regas la tradukadon, sed ĝi havas diversajn facilajojn mankantajn al naciaj lingvoj. Samnaciono de la verkisto devas fari la tradukon, kaj se li ĝisfunde konas sian propran lingvon kaj Esperanton, li faros pli fidelan tradukon ol ali-

landulo. Precipe tio estas pli grava por nacioj kiel Estonio, Latvujo, Japanujo, Katalunujo, Hungarujo, kies naciaj lingvoj estas nekonataj de eksterlandanoj, ĉar traduko rekte el nacia lingvo estas multe pli leginda ol traduko de traduko. Eĉ plej bonaj tradukoj de fremdaj verkoj en aliajn naciajn lingvojn havas fremdan nuancon, ĉar se la traduko konservas la spiriton de la nova lingvo, ĝi perdas la spiriton de la originalo, sed Esperanta traduko konservas nacian nuancon, ĉar ĝi estas neŭtrala, uzebla laŭ plaĉo de la tradukanto. Esperanta traduko de «Les Misérables» de Victor Hugo, estas pli franca laŭ spirito, ol angla traduko, kiu ŝajnas nek angla nek franca, sed fremda kaj malvigla. Estas preskaŭ neeble imagi, ke «La Faraono» de Prus, «Tragedio de la Homo» de Madach, «Per Balono al Poluso» de Andrée, «Eŭgeno Onegin» de Puŝkin, estas tradukoj, ili tiel altgrade posedas la spiriton de la originaloj, pro la zorga tradukado de samnacionoj.

Ne estas necese enkonduki novajn vortojn Esperantigitajn el la nacia lingvo, kiel kelkfoje okazas. Per ofta legado de bonstilaj Esperantaj tekstoj, oni amasigas grandan provizon da vortoj, parolturnoj, metaforoj, proverboj. Tamen, estas permesate fari novajn vortojn el Esperanta radikaro per kombino kaj kunmetado, vortojn eble neniam antaŭe uzatajn, sed kies signifoj estas tuj internacie kompreneblaj. Pri tio skribis S-ro Grosjean-Maupin, «la deziron enkonduki novan vorton naskas certe malpli ofte nepre bezono, ol nur ia spirita malpenemo, pro kiu ŝajnas oportune kaj malpli penige, alivestigi rapide per Esperanta finiĝo iun nacian, al ni kutiman radikon, ne eĉ iomete klopodinte, por serĉi la vere Esperantan, ordinare kunmetitan esprimon de la tradukota ideo».

Fine, estas nepre konsilinde, ke la tradukota verko estu laŭ la lingva kapablo kaj povo de la tradukonto, ĉar oni devas forgesi la proprajn pensojn kaj sin inspiri per la pensoj de la verkinto. Tamen, senpretenda lingvaĵo ne signifas senarta; eĉ simpla penso povas esti poezie esprimita se tradukate bonstila kaj ĝustamaniere. Por montri la diferencon inter laŭvorta kaj poezia traduko, jen sekvas du tradukoj de angla poemo, unu farita de ordinara persono kiu tradukis simple la ideojn, kaj la alia havanta samajn ideojn sed en poezia formo inspirita de la fantazio de la originalo.

LA BELO

Kvankam la Belo atendas en sennombraj sanktejoj,
Tumulta amaso ne piedpaŝas ŝiajn vojojn,

Ĉirkaŭ ŝiaj pordoj kompata hedero volviĝas,
 Homamaso ne plektas girlandojn de ĝoja kantado,
 Sed solecaj vojaĝantoj kun ardantaj koroj
 Piedpaŝante la grizajn malamikajn vojojn de la mondo
 Faletas senscie ĉe ŝiaj temploj, kaj petegas
 Radian vizion, mallongan horon de laŭdo;
 La ĉiambrulantan flamon ŝi povas doni,
 Ŝi plenigas ilin malavare per fruktodona tajdo;
 Ne plu malvigle Aĝo fleksas siajn ostajn ŝultrojn,
 Ĝojege li reprenas sian junan paŝadon
 Kiam al la sango la sama mola ordono blovas
 Kiu vekas la aŭroron sub roza baldakeno.

2

Tre multaj sennombraj sanktejoj de Bel'
 Troviĝas kaŝite sur tero,
 Iliajn pordegojn per ĉarma verdhel'
 Ornamas floranta hedero.
 Ne ofte vekadas la kantoj de ĝoj'
 Silenton de tiu soleco,
 Ĉar estas dezerta, senhoma la voj'
 Al temploj de sankta Beleco.
 Malofte post vojo farita sen tim'
 Tra baroj de l' viva vagado,
 Atingas, kun koro ardanta, pilgrim'
 La celon de sia revado,
 Li ŝatas eĉ por la mallonga moment'
 Kuniĝi kun vivo alia,
 Kaj senti, kaj vidi, en brila torent'
 Aperon de Belo vizia.
 Sed Belo, sen ia alud' de rezist'
 Sin donas al homo per fluo,
 Por vivo, por tuta de l' tera ekzist'
 Por ĉarma, eterna, la ĝuo.
 Ĝi donas sin eme al sankta ofer'
 En ĝi rejuniĝas popolo,
 Similas ĝi brilojn de l' suna aper'
 Sur blua ĉiela kupolo.

EMMA L. OSMOND

BIBLIOGRAFIO

Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio eldonita de Esperantista Centra Librejo, 11, rue de Sévres, Paris, 15×12, 32 paĝoj. Prezo: 2 fr.

Ĝi enhavas la regularon de la Lingva Komitato kaj tiun pri verkoj rekompencotaj de la Akademio, liston de la lingva-komitatoj kaj akademianoj kaj ceterajn detalojn pri tiu alta institucio. Je la fino ĝi publikigas la Zamenhofan sistemon pri la landnomoj.

Gvidfolio de Tirolo eldonita de Landa Trafik-Oficejo de Insbruck, Aŭstrujo. Traduko de Dro. Blaas.

Tre interesa faldfolio kun belegaj fotografaĵoj. Se iu povus dubi pri la beleco de Tirolo, tiu folio konvinkus lin facile.

ENLANDA MOVADO

Manresa. — La malnova grupo «Bela Espero» vigle reorganiziĝis kaj multaj novaj batalantoj enviciĝis. La nova adreso estas: strato Piques, 1, ĉe «Ateneu Obrer Manresa». La nova komitato konsistas el Antoni Muset, prezidanto; Marià Guilà, vicprezidanto; Angel Llobet, sekretario; Josep Comas, Vicsekretario; Vicenç Oller, kasisto; Pere Saumell, kalkulisto; Ramir Sánchez, bibliotekisto; Carme Ramos kaj Modest Tuset, voĉdonantoj.

Ripoll. — Sub la gvido de s-no Estivill okazas praktika kurso bone vizitate. Dank'al la propagando por la Kongreso de KEF. 1935, la enzusiasmo por esperanto kontentige kreskas ĉe diversaj medioj.

Vendrell. — La lasta Kongreso de KEF. kune kun la praktika rezultato de la ĉe-kurso donis novan forton al la Klubo, kies kunvenoj estas multnombre ĉeestataj.

Korespondadon deziras:

F-ino Maria Martorell, str. Salmeron, 15, Vendrell.

F-ino Rosalia Vilanova, str. Angel Guimerà, 14, Vendrell.

F-ino Maria Grau, str. Prat de la Riba, 21, Vendrell.